

Carl Riedel,
Venu, paŝtistoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Venu, paŝtistoj,
Vi homoj al ni!
Venu kaj vidu
La filon de Di'!
Kristo hodiaŭ
Por vi naskiĝis,
Via Savanto
Li elektiĝis.
|: Ne timu vi! :|

Venu rigardi
Vi tion kun ni,
Kion promesis
Ĉiel-melodi'!
Kion vi trovos.
Ni diskonigu,
Kaj la Sinjoron
Ni honorigu!
|: Haleluja! :|

Estas ĝojego
Por la paŝtistar',
La sciigaĵo
De la anĝelar':
Inter la homoj
Nun iĝu paco
Kaj sur la tero
La Dia graco.
|: Al Di' honor! :|

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de CARL RIEDEL (*1827-10.05 - †1888-06-03) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982.*

MR-014-3 / Arg-565-1140 (2010-09-20 10:01:32)

La muziknotojn vidu jen: http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038.

Carl Riedel,
Aŭdu, paŝtistoj

tradukita de Albrecht Kronenberger

Aŭdu, paŝtisto,
mi diras al vi
Bonan sciigon
pri l' Filo de Di':
Enkarniĝinta,
ĵus naskiĝinta,
Ĉirkaŭvindita,
entrogigita.
Gloron al Li!

Vidu, homidoj,
la amon de Di'.
Malsupreniris
la Vorto por vi.
Kruce murdota,
entombigota,
Resurektonta,
ĉiel-ironta.
Gloron al Li!

Venu, kristanoj,
rapidu al Li,
Kiu bebiĝis
en stalo por vi.
Miru ĝojante,
kore kantante,
Genufleksante,
Lin adorante.
Gloron al Li!

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de CARL RIEDEL (*1827-10.05 - †1888-06-03) en Esperanton de ALBRECHT KRONENBERGER (*1940-01-21) en 1990.*

Arg-565-1142 (2010-09-20 11:11:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la retejo <http://reocities.com/cigneto/thctxt/a/auxdupasx1.html>.